

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinárodního jazyka.

Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161

Povolil OÚ Ml. Boleslav, odb. kultury čj.47/87-403/16

Podávání novinových zásilek povoleno Oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze,
čj.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1998

xmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmxmxxmx
Numero 2 Aprilo 1993 Duben Číslo 2

[illegible]

Ĉu vi kapablas argumenti por Esperanto? Devo de ĉiu esperantisto estas propagandi la lingvon. Tamen multaj plendas pri la fakto, ke mankas konvena propaganda manlibro, kie niaj samideanoj povus legi argumentojn, kiuj mankas dum la diskuto, ĉu estas Internacia lingvo, bezonata kaj kiel ankoraŭ ĝi ne disvastiĝis kaj ne ĝeneraliĝis.

Ni alvokas ĉiun spertan esperantiston helpi dum preparo de broŝureto (aŭ serio da artikoloj en nia bulteno), kie ili povus trovi tiujn argumentojn . Ni devas esti preparitaj respondi la riproĉojn per konvenaj faktoj, kiuj povus nuligi certecon de niaj kontraŭuloj.

Jen kelkaj plej kutimaj riproĉoj:

Esperanto estas lingvo artefarita.

Esperanto estas nur hobio.

Ĉu lingvo nur por koresponda uzo?

Sciencistoj ne plu bezonas internacian lingvon, sufiĉas la angla.

Esperanto estas jam morta lingvo – post centjaraprovo ĝi ne ĝeneraliziĝis, la junularo ne plu interesiĝas pri ĝi.

Esperanto estas morta, ĉar ĝi ne havas propran poezion. Eĉ la evoluantaj nacioj ne akceptis Esperanton.

Esperanto pereis pro sekteco de la kluboj kaj organiza malkapablo.

E-o arigas nur revulojn, kiuj ignoras la lingvan situacion.

E-o kiel historia provo ne plu havas ŝancon transvivi.

Cerbumu (Zamyslete se) super ĉiu tiu ĉi riproĉo kaj provu respondi ĝin. En estontaj numeroj ni sinsekve pritraktos la problemaron. Sendu afable viajn amendojn (připomínky), kiujn ni povus publikigi. Pli multaj kapoj pli multon scias – diras nia saĝa proverbo. Nun, kiam plimulte da publiko opinias, ke Esperanto ne havas ŝancon kontraŭ la angla, ni devas streĉi (napnout) niajn fortojn.

Skolta esperantista ligo.

La 24-an de aprilo oni festas sanktan Georgon. Por geskolto estas tiu ĉi tago granda festo. Okaze de tiu ĉi festo kelke da vortoj pri la Skolta esperantista ligo (SEL). Jam en la jaro 1912 A. B. Svojsík en siaj „Fundamentoj de skoltado“ rekomendis al geskoltoj lernadon de fremdaj lingvoj; inter aliaj li atentigis pri Esperanto. Post la unua mondmilito en la jaro 1918 „Avoto“ Alexander William Thomson fondis SEL – Skoltan esperantistan ligan. De tiu tempo Esperanto funkcias tutmonde kiel pontlingvo inter ĉiuj geskoltoj. Dum ĉiuj Ĵamboreoj – skoltaj tendaroj, similaj al Universalaj Kongresoj de E-o – ne mankis tendoj de reprezentantoj de SEL. Ankaŭ dum Ukoj kunvenas SEL. Bazo de skoltesperantistoj konstante kreskas. En nia lando jam de la unua respubliko senĉese laboras SEL- sekcio ĉeĥoslovaka. Nun ni travivas refondiĝon de skoltado. SEL- sekcio disvastigas intereson pri Esperanto. Ĉu vi estas aŭ estis skolto, -ino? Ĉu vi ankaŭ volus helpi al SEL? La kontaktadreso estas jena: SEL, Klubo de esperantistoj 67401 Třebíč. Bonvolu festi la sanktan Georgon en niaj vicoj. Estu preta! Karfi, olda skolto, Miloš Zelenka, Havanská 2099, 27201 Kladno-Kročehlavy.

Ĉu dulingve? Ĝi estas daŭra problemo de esperanta gazetaro, aperanta ankaŭ inter demandoj de nia legantaro. Ĉar ni volas, ne nia bulteno havu edukan karakteron por komencantoj, ni pliparte uzis dulingvan formon. Tamen aliaj riproĉas, ke tiaj artikoloj logas la legantoj legi nur nacilingvan kolonon. Tio estas problemo de respondeco de ĉiu unuopulo. Pro manko da spaco kaj ankaŭ pro tio, ke malkreskis la nombro de niaj legantoj-komencantoj, nun aperas en nia bulteno ĉiam pli multaj unulingvaj artikoloj. Ankaŭ la enhavo de la artikoloj iom ŝanĝigos. Ni ne volas konkurenci al STARTo. Ĝia kvalito kreskas de numero al numero.

Skautská esperantská liga.

24.dubna je slaven svátek svatého Jiří. Pro skauty a skautky je tento den velkým svátkem. U příležitosti tohoto svátku několik slov o Skautské esperantské lize. Už v r.1912 A.B.Svojsík v knize „Základy skautingu“ doporučuje učit se skautům a skautkám cizím jazykům; mezi jinými upozornil na esperanto. Po první světové válce v r.1918 Alexandr William Thomson „Avoto“ založil SEL – skautskou esperantskou ligu. Od té doby se Esperanto stalo pojítkem pro všechny skauty a skautky. Na všech jambore – skautských táborech, podobných esperantským světovým kongresům – nechyběly stany zástupců SEL. Také při Světových kongresech Esperanta schází se SEL. Základna skautských esperantistů stále vzrůstá. V naší zemi již od první republiky nepřetržitě pracuje SEL- československá sekce. Nyní prožíváme obnovení skautingu. SEL-sekce rozšiřuje zájem o esperanto. Byl jste nebo jste skautem či skautkou? Chcete také vy pomoci SEL? Kontaktní adresa je: SEL, Klub esperantistů 67401 Třebíč. Prosím oslavte svátek sv.Jiří v našich řadách. Buď připraven! Karfi, old skaut, Miloš Zelenka, Havanská 2099, 272 01 Kladno-Kročehlavy.

Dvojazyčně? Je to trvalý problém esperantského tisku, objevující se v dotazech našich čte.nářů. Proto aby náš buletin měl výchovný charakter pro začátečníky, užívali jsme většinou dvojazyčné formy. Jiní však vyčítají, že takové články svádí čtenáře čist jen český sloupec. Je to problém odpovědnosti každého jednotlivce. Kvůli nedostatku prostoru a také proto, že klesl počet čtenářů – začátečníků, nyní se objevuje v našem buletinu stále více jednojazyčných článků. Také obsah článků poněkud se změní. Nechceme konkurovat STARTu. Jeho kvalita roste od čísla k číslu.

Vi trovos ĉiam en ĝi freŝdatajn informojn pri diversaj renkontiĝoj kaj aliaj aktualaĵoj. La kluboj alkiutimiĝis aperigi en ĝi raportojn pri ilia aktiveco. Ĝi aperas tute regule en amplekso, kun kiu nenia alia ĉeĥa bulteno povas kaj ne volas konkureci. Vivtenado de nia asocio estas je unua tasko de esperanta anaro. Sed nia asocio ni ne havus vendejon de nia literaturo, ne okazus tutŝtataj konferencoj, ni ne havus reprezentanton en UEA. Ne forgesu disvastigi eventuale per sendo de provnumero al via eksterlanda korespondamiko, kie mankas raportoj pri aktuala stato de nia movado. STARTO elstaras inter alilandaj gazetoj pro sia lingva nivelo, presformo, enhavo. Certe ĝi meritas nian helpon.

Najdete vřdy v nřm řerstvř informace o rřznřch setkřnřch a jinřch aktualitřch. Kluby se nauřily uveřejřnovat v nřm zprřvy o svř aktivitř. Vychřzř zcela pravidelnř v rozsahu, s kterřm nemřře a nechce konkurovat řřdnř jinř řeskř bulletin. Udrřenř pri řivotř nařř asociace je prvnřm řkolem esperantskř řlenskř zřkladny. Bez nařřeho svazu nemřřli bychom prodejnu nařř literatury, nebyly by celostřtnř konference, nemřřli bychom zřstupce v UEA. Neopomeřte rozřřřovat ev. zasřlřnřm řřsla na zkouřku vařřemu zahraniřnřmu koresp. přřteli, kde chybř zprřvy o aktuřlnřm stavu nařřeho hnutř. STARTO vynikř mezi zahraniřnřmi řasopisy svojř jazykovou řrovnř, tiskovou formou, obsahem. Jistř si zaslouřř nařř pomoci.

Ĉu vi ne forgesis?

ĈEA-GEA komuna kongreso en Karlovy Vary 28.-31.V.93. Ĉeftemo: Esperanto—řlosilo al najbaroj en Eřropo. Temas pri la 7-a ĉeĥa kaj 71a germana kongreso. Ĉar ni ĉiuj devas řpari, kalkulu pri minimuma elspezo de 420 Křs (kongreskotizo, manĝado, loĝado). Klubaj delegitoj ne pagas la kongreskotizon de 100 Křs.

Detalaj informoj ĉe nia asocio. Aliĝu ĉe Věra Podhradskř, Pořřř 1, 60300 Brno.

Nezapomnřli jste?

ĈEA-GEA společnř kongres v Karlovřch Varech 28.-31.V.93. Hlavnř třma: E-o, klřř k sousedřm v Evropř. Jde o 7.řeskř a 71.nřmeckř kongres. Protoře vřřichni musřme spořřit, pořřtejte s minimřlnřm vřdejem 420 Křs (kongresovř poplatek, jřdlo, bydlenř). Klubovř delegřti neplatř kongresovř poplatek 100 Křs.

Podrobnř informace u nařřeho svazu. Přřhlařte se u Věry Podhradskř, 60300 Brno.

Niaj forpasintoj: La 15an de februaro mortis en Pardubice s-ano Ludvřk Sitka en la aĝo 86jj. Li ĉiam ofereme subtenis nian movadon kaj partoprenis en la aranĝoj de la loka klubo.

En Mladř Boleslav mortis Frantiřek řimřnek, nia plej aĝa klubano, en la aĝo de 94 jaroj, ano de ĈEA. Kun Esperanto li trairis precipe sudfrancion, kaj estis la lasta ano, kiu partoprenis en la konata nia sola UEA-kongreso 1921 en Prago (fondo de SAT en Prago. Pri tiu ĉi kongreso li antařnelonge publikigis rememoraĵojn en nia bulteno.

Post grava malsano forpasis la 1-an februaro en la aĝo 68 jj s-no Josef Vřtovec el Vodňany. Li apartenis al la plej aktivaj esperantistoj de suda Bohemio kaj estos neniam forgesata de siaj gesadeanoj pro sia helpemo kaj oferemo.

Rememoraĵo: la 19a de januaro estis jubilea tago de s-ano Teo Novotnř el Liberec, kiu naskiĝis antař 90 jj kaj forpasis la 17an de decembro 1974. Sprita samideano, kies humuro ĉiam helpis teni bonan atmosferon de klubaj kunvenoj. Li ĉiam řerce asertis (tvrdil), ke Esperanto en nia lando estis gepatra lingvo de niaj prauloj, pri kio atestas la deveno de urbonomoj en nia regiono.

Ekzemple: Boleslav – slavoĵ boli; Budějovice – budoĵ staris laŭvice; Bělá – bela; Benešov – bene ŝovis; Čáslav – ĉasis kaj lavis sin; Děvín – de vino; Karlovy Vary – Karloĵ havis varojn; Libeň – li benis; Litoměřice – lito meritis; Litvínov – trinkis vinon kun ovoĵ en la lito; Mikulov – Mikelo (Míša) manĝis ovoĵn; Opava – ope promenas avoj; Prago – prago-o (ĉina ludo); Pardubice - por dubi; Ruzyň – ruzaj inoj; Terezín – teraj uzinoj; Velvary – velaj varoj; Krkonoše – korka nazo; Nový svět – nove svatis; Semily – se miloj; Nová Paka – nove pakis; Bakov – bakis ovoĵn; Turnov – turo nova; Příšovice – priŝovice; Český Dub – Ĉeĥoj dubas; Hodkovice – hodiaŭ kovis; Děčín – devenas jam de ĉinoj; Kolín – kolo de ino; Brandýs – brando; Lány – Lano; Jaroměř – jaro meritis; Čelákovice – vico da domoj ĉe lago; Rožmitál – roza mito; Svitavy – ŝvitas la avoj; Kost – kostas; Karviná – kara vino; Kroměříž-anoj – manĝis krom rizo ankaŭ terpomojn; Rábí – rabistoj; Pacov – paco; Třeboň – tre bona; Neratovice – en ĝi ne estas vico da ratoj; - multajn aliajn nomojn el via regiono vi povos aldoni kiel pruvon pri esperantistaj prauloj. Pripensu kaj skribu al ni viajn filologiajn spritaĵojn.

O f e r t o n pri 31 esperantaj aranĝoj en Ĉeĥio kaj 16 en Slovakio alportas STARTO. Vere ni ne devas plendi, ke ne estas okazo por renkontiĝoj. Ankaŭ eksterlanden vi povas veturi kun rabato por esperantistoj kun agentejo KAVA-PECH (Anglická 878, CS 25279 Dobřichovice) – kultura kaj vetura agentejo de Petr Chrdle – al San Marino, AIS, UKo en Valencio, SAT en Kazanlak Bulgario (+Turkio) – plue kun Interhelpo p.př.44 15000 Praha 5 al Litovio, Bulgario, Tunizio. Multaj estos renkontiĝoj de junulara sekcio (interkonatiĝaj aranĝoj por novuloj- preparo por asociaj ekzamenoj – informoj Vladka Chvátalová, ČES, Jílská ul.10, Praha 1). Turismaj agentejoj informas pri rabatoj por esperantistoj. Petu informojn.

L a n ĉ o v ankaŭ gastigos esperantistojn per riĉa eduka programo en kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Okazos tri 14tagaj etapoj inter 4.VII ĝis 14.VIII. Prezoj por junularo de 1500.- ĝis 1700.- Kčs, por ceteraj 1700.- ĝis 1900.- Kčs. Nenie vi tiom gajnos de lingvoscio ol dum la kurso en Lančov kun spertaj instruistoj.

Unueco de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj rezultis dum kunsido de la kunordiga komitato la 21-an de novembro 1992 en Strážnice. Kunsidis ĉeĥoj Chrdle, Kočvara – kaj slovakoj Zvara, Košecký, Göldrich. Jen ilia deklaro: „Respektante la procedon de memstariĝo de la Ĉeĥa kaj Slovaka Respublikoj la Kunordiga Komitato de ĈEA kaj SEA esprimas sian firman intencon daŭrigi la ĝisnunan kunlaboron kaj reciprokan helpon, eĉ daŭre profundigi ĝin. La tradicie bonaj rilatoj inter ambaŭ asocioj estu kontribuo (příspěvek) al ilia estonta klopodo (snahu) pri fruktodona (plodnou) kunlaboro.

Vigla estas la rondeto en Nový Bor. Dum la lernejjaro ili sukcesis kunveni ĉiumerkrede kun meza partoprennombro de 12 gesamideanoj! Ili starti bazan kurson de E-o por lerneja junularo kun 6 infanoj kaj 1 instruistino. Alterne instruas novaj instruistinoj de E-o Věra Boleslavová kaj Milena Jahodová, al kiuj nia bulteno deziras plenan sukceson! La klubo ligis amikecajn rilatojn kun eksterlandanaj esperantistoj, precipe el Belgio, Francio kaj Nederlando. La klubanoj partoprenis en E-konferencoj en Vieno, Kaunas, Stříbro kaj Ústí. Ili ankaŭ ne forgesas viziti esperantistojn – izolulojn, kiuj ne havas rondeton en sia loĝloko (bydliště). La klubo aranĝos sabate la 22an de majo 93 renkontiĝon en Nový Bor kun piedmarŝo de proksimume 8 km. Informojn sendos al vi la klubestro Karel Kratochvíl, 47301 Nový Bor, Rumburských hrdinů 745.

Fakterminaroj: Ofte oni plendas, ke mankas fakterminoj de via fako. Ne eraru. Pliparto da fakaj terminoj estas enhavigataj (obsaženy) v Plena Ilustrita Vortaro (1976) kun suplemento (1986) kaj Bildvortaro (1989), ambaŭ grandampleksaj. Ni scias, ke ne ĉiu povas havi ilin, kaj pro tio ne hezitu (neváhejte) kaj demandu ĉe nia redakcio, se vi ne konas la pravan terminon. Viajn termin-proponojn konsultu kun Terminologia Esperanto Centro, Petrohradská 3112, 27204 Kladno.

Malmultaj niaj legantoj scias, ke Verda Familio glate aperas dank' al financa prizorgo, kontora flego de fidela samideano Karel Blažek el Mnichovo Hradiště, kiu solenis la 21-an de decembro 1992 sian jubileon (80-jariĝon), kion vi jam povis legi en Starto. Kvankam li komencis lerni esperanton en sia 93a jaraĝo, pro sia persistemo kaj diligento li rapide atingis altan nivelon de lingvoscio kaj estiĝis instruisto, kiu oferte instruis ripete ankaŭ en Lančov. Li akceptu prokrastan gratulon ankaŭ de nia legantaro.

III- internacia esperantista suprenmarŝo al Praděd kune kun renkontiĝo de reprezentantoj de moraviaj E-klubo okazos la 19-an de junio je la 9,30 h. Tranokto de 18-a al 9-a estas certigata en hotela tranoktejo Studánka (50 Kčs). Aliĝu ĉe Štefan Takáč, Hrdinů 1158, Uničov.

Antverpo 93: Se vi ne partoprenos UKon en Valencio (individue aŭ kun KAVA PECH (vidu supre) ni rekomendas partopreni dum antaŭkongresa semajno (16-23.VII.) Internacian Kulturan Semajnon. Vi spertos vidi la urbon de Rubena kun multaj muzeoj pri pentro-arto, skulptaĵoj, juvelarto (umění drahokamů), ĉevaloperon prezentatan (uvedenou) de ciganaj artistoj, koncertojn, orgenmuzikon en katedralo ktp. Vian restadon kun moderaj prezoj por esperantistoj prizorgos Flandra Esperanto-Ligo Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Medicinistoj, flegistinoj – havas en la programo interesajn renkontiĝojn. Dum la kongreso de ĈEA kaj GEA en Karlovy Vary estas planata la 30an de majo je la 10a horo kunveno de ĉ+g medicinistoj. 8.-11.7.93 okazos en Veszprém (H) 9-a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco kun riĉa scienca kaj amuza programo. Adreso de sekretario: Dro István Hegyi, H8200 Veszprém, Batthyvány ut.19/D.2/9. Helpu al sukceso de la renkontiĝoj per via aktiva partopreno.

Modelan propagandan laboron faras s-ano Vladimír Sládeček, 71800 Ostrava 18, Chamrádova 22. En la loka gazeto DAR li sukcesis publikigi multajn artikolojn pri E-o, per kiuj li vekis (vzbudil) intereson de la publiko, precipe per priskribo de lia aŭdaca (odvážná) Trabant-veturo al Kaunas. Li havas 11 novajn gelernantojn. Por kunlaboro li aktivigis geedzojn Drastichovi, kiuj havas vendejon de reformita nutraĵo kaj 75 speciojn de kuracherboj (fa DIGEST, Na desátém, 70100 Ostrava) kaj preskaŭ senprofita vendas ilin kaj propagandas E-o en ilia montroŝranko. Persistema laboro alportas sian frukton. Ĉirkaŭrigardu kaj provu, ĉu ne eblus en via regiono simile varbi por nia lingvo. Precipe la kunlaboro kun loka gazeto estas profitdona.

Prepozicioj. Multaj riproĉas al Esperanto, ke en ĝi estas uzataj prepozicioj diverssence laŭ la nacio de la tradukanto. Kelkaj kuraĝas eĉ malkovri la naciencan de la aŭtoro. La bona aŭtoro devas ĉiam respekti la internaciecon de la lingvo. Oni devas lerni pensi internacie. Al tio servas du bazaj verkoj: Plena Ilustrita Vortaro kaj Plena Gramatiko. Ĝi trastudo postulas (vyžaduje) grandan penon (námahu) kaj diligentecon (píli). Tamen temas pli unu el la plej gravaj ĉapitroj de esperanta gramatiko kaj pro tio ni almenaŭ trarigarde alportu difinon pri uzo de kelkaj prepozicioj. Dum studo de tiu problemo uzu la vortaron de gramatika nomenklature, kiun ni aperigis en la lasta numero de Verda Familio.

La prepozicioj en Esperanto finiĝas per -aŭ (antaŭ, kontraŭ) aŭ per konsonanto (per, en, ekster) aŭ per vokalo (da, de, je).

La prepozicioj povas kuniĝi kun prefikso (malantaŭ, kde), kun alia prepozicioj (el sub, de sur, el inter) aŭ formi prepoziciaĵon kun adverbo (dekstre de, depende de, fronte al, kun kun).

La prepozicioj povas stari antaŭ adverbo (por ĉiam, de eterne, ĝis ĉi tie), antaŭ pronomo (anstataŭ li, laŭ mi, sen tio) aŭ – plej ofte – antaŭ substantivo (al la patro, sen libro).

La prepozicion ĉiam sekvas nominativo. La akuzativa finaĵo post prepozicio aperas ne pro la akuzativo mem, sed pro la direkto (sur la tablo x sur la tablon, antaŭ mi x antaŭ min). La regulo ne validas por AL kaj ĜIS, kiuj ĉiam indikas (znamenají) direkton (al la urbo, ĝis la domo).

Esperanto havas jenajn prepoziciojn: al, anstataŭ, apud, cis, ĉe, ĉirkaŭ, da, de, dum, ekster, el, en, far, ĝis, inter, je, kontraŭ, krom, kun, laŭ, malgraŭ, per, po, por, post, preter, pri, pro, sen, sub, super, sur, tra, trans.

Multajn prepozicioj estas uzeblaj kiel prefiksoj en kunmetaĵoj (eniri, eliri, kuniri, preteriri ktp.).

El la prepozicioj estas ofte derivitaj vortoj, t.n. aprioraĵoj, originale kreitaj en Esperanto, kiuj beligas precipe poezian lingvon kaj nepre estas uzendaj: antaŭo, antaŭa, antaŭe, posta, poste, anstataŭi, anstataŭigi k.s.).

Uzi prepoziciojn sklave tradukitajn malsarkas (zapleveluje) niajn lingvon kaj la sklavaj tradukoj faras ĝin nekomprenebla. Plej konvene estas pro tio serĉi en originalaj verkoj de Zamenhof.

Sinsekve ni aperigos prepoziciojn kun iliaj tipaj ligoj al aliaj vortoj.

AL – signifas funkcion:

- a) Direkton (iri al Prago).
- b) Gramatikan rilaton post verbo (diri al la patro; substantivo (sopiro al la patrio); adjektivo (ĝentila al damoj) kaj adverboj (dank' al tio).
- c) Rezulto de la movo: (disrompi vazon al pecoj; sopiro al la hejmo; deziri bonon al iu; inklino al io).
- d) Atribuon (přirčení), destinon (určení), apartenecon (příslušení): doni, proponi, komisi, sendi ion al iu (apliki teorion al praktiko; kondamni iun al morto; preni al si rajton fari ion).
- e) Interesatecon (zainteresování), profiton, malprofiton, kiun iu ricevas per la ago (servi; malutili al iu; starigi al iu monumenton; estas al mi varme; li faris al si veston).
- f) Malprecizan, preskaŭ nur malplenan gramatikan rilaton (danki, helpi, aludi /zmínit se o/, kompati, plaĉi, rilati aliu, io).
- g) Daton, ĉe kiu oni faru ion (dankon por via sendaĵo al nia naskiĝtago; gratulo al Novjaro) – prefere uzu okaze de.
- h) Gramatikan rilaton inter ag-substantivo kaj ties objekta suplemento (subtenado al io; ofendo, persekuto, protektado, ŝato, timo, voko al iu, io).
- i) Post adjektivo aŭ adverbo:
 - 1) Estmanieron de la koncernataĵo rilate al iu ol io (afabla, avida, danka, favora, inklina al)
 - 2) Bonan aŭ malbonan econ de iu al io rilate al la koncernataĵo (abomena, agrabla, antipatia, kara, simpatia al)
 - 3) Konkretan aŭ metaforan proksimecon aŭ malproksimecon (konforma, egala, simila, parenca, najbara al; dank' al, spite al).

Al kreas ankaŭ apriorajn terminojn: alaĵo (io, kio estas aldonita al io) – aligi (almeti, aldoni ion al io); aliĝi (aldoniĝi, almetiĝi, aniĝi, aparteniĝi). - AL povas esti uzata ankaŭ kiel prefikso: alkonduki, alporti, alkuri, alkonduki, alrigardi, alparoli, almezuri, alpropriĝi, alfari, alĝustigi, aldoni, almeti ktp. (Daŭrigota)

SKOKOVY – pensiono apud Turnov – en koro de Ĉeĥa paradizo invitas parolantajn esperantistojn (aŭ almenaŭ tiujn, kiuj klopodos paroli esperante) al 4taga restado 28.X.-31.X.93 en luksa familia medio kontraŭ pago de elspezoj (100 Kčs tage por loĝado+manĝado). Celo: paroligi komencantojn, renkontiĝo de senioroj. Informoj ĉe la redaktoro.

Kiel diri? Praktika esperanta frazeologio – LENTAIGNE: Komparoj (daŭrigo): Kreski kiel fungo post la pluvo. - Kurbiĝi kiel diablo en akvo benita. Malaperi kiel malbona sonĝo. Mensogi (lhát) kiel gazeto, funebra parolado. Ridi kiel kreteno. Rigardi stulte kiel ŝafo. Salti (skákat) kiel urso (medvěď) ebria. Soni (zvučet) kiel malplena barelo. Tremi (chvět se) kiel folio aŭtuna. Vidi sur tero kiel en inferno (peklo). Vivi kiel hundo kaj kato. Ĉasta kiel glacio. Fiera (pyšný) kiel pavo, Hispano. Ĵaluza (žárlivý) kiel tigro. Klara kiel kelo (sklep) nokte. Libera kiel birdo. Maldika kiel haro. Malgrasa (hubený) kiel skeleto, kiel balailtenilo (držadlo od koštěte). Malriĉa kiel muso preĝeja. Milda kiel ŝafido (ovečka).

KORESPONDI DEZIRAS Mallongiloj (Zkratky): bk=bildkartoj; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; iŝ=interŝanĝi; its=interesiĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondas; kor=korespondas; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; s-ano=samideano; s-ro=sinjoro; s-nino=sinjinino; etm=tutmonde.

45-jara esperantistino d kor kun katolikaj geesperantistoj el la tm. S-rino Vlasta Kratěnová, Dědická 7, 62700 Brno CS.

Jag Karain Sharma, vic-prezidanto de Tuthinda Esperanto Federacio, 38 Beldari Lane Lalbagh Lucknow 226001 India organizas junularajn esperanto grupojn en Hindio kaj petas de ni adresojn de korespondemuloj.

Koresponda servo de Kroata Esperantonunuiĝo, Try Bunze 2, HRU-41000 Zagreb, Kroatio petas sendi adresojn.

Antonio Rodriyuaes dos Santos, Av.Engenheiro Santana Junior, 1303, Planalto de Aldeota (Papicu) CEP 60, 175-65C Fortaleza Ceará Brasil.

Bronislaus Butkauskas, 47jj, v.Kraves 117/8, 233041 Kaunas, Litovio, ĉt, tm.

Dita Kučiauskaite (36jj) Basanavičiaus al58-8, 3009 Kaunas, Litovio.

Ivan Petrov bul.Mogilev 35, ap.10, 6300 Gabrovo, Bulgario, tm, ĉt.

Marcelo de Silva Ricardo, Rua Regina N063, Campo Grande, Rio de Janiero CEP 23010 Brazil

Timur Sadikov, 17jj SU-66041, USSR Siberio, Krasnojarsk, Pr.Svobody 50-18

Kastora Klubo de Esperanto, ul.Pulavska 3-11, 02-515 Warszawa, PL kor tm.

KULTURA CENTRO „La libro“ BP 232 Mbanza-Ngingu, Zaire, kor tm.

Mr.Grant Scott, PO Box 15-659, New Lynn, Auckland 7, New Zealand.

S-ro Correy Johnson, PO Box 648, Mc Intosh, Ala 36553, US 12 jj tm ĉt.
S-ro Osho Davies Oluwabunni, PO Box 98, R13 Iwaro Quater, Osi-Asiss Ekti, Nigeria.
S-ro Victor D.Echenangusia Angelbello, Jesus Menendez 178, Trinidad, CP 62600, CUBA 10jj.
Vasil Kubas, ul.Galicka 5/43, 293500 Strij, UKRAINA tm ĉt
S-ro Nogoma Kikoado, Ciza Lukala, BP 7598 Kinshasa 1, ZAIRE ĉt.tm.
S-anino Albertino Metodo Lianete, Av.Munsieto Nill, Cite Nsele, Inkisi, Bas-Zaire, ZAIRE tm ĉt.
22jj
Vasil Kubas, ul.Galicka 5/43, 293500 Strij, Ukraina tm, ĉt
S-ano Nogoma Kikoado, Ciza Lukala, BP 7598 Kinshasa 1, ZAIRE tm, ĉt.
S-anino Albertino Metodo Lianete, 22jj Av.Munsieto Nil, Cite Nusle, Inkisi, Bas-Zaire, ZAIRE ĉt,
tm
S-ano Aleksandr Koval, 246029 Gomel, Pr.Oktjabra 71-39, White Russia
S-ano Francisco L.Veuthey, Nuguen 848, RA 3530 Quitilipi (CH), Argentina
S-ano Carlos A. Ruiz, Av.Chaco 1185, Ra-3530 Quitilipi (CH) Argentino, 17jj
S-ano Conrado Fisher, RT6 Box 198, Neadville, PA16355 US
S-ano Nikolas Hawlat O., Rural Route, Dorchester.NE 68343 US
S-ano Hayrettin Dural, Akin Sokagi 18, D-7, Suadiye/Istambul 81070, TURKEY
Klubo Esperanto, Logossou Kosai Anyronkope, BP 276, Aneho, TOGO.
S-ano Shabani H.Kalyambike, c/o Juma Waziri, PO Box 105 Tabora, Tanzania
S-ano Marcel Perray, GPO Box 1846, Bankog 10501, THAILAND
S-ano Jaques Lavanchy, Tramenaz 21, CH-1814 La tou de Pail, Svisujo
S-ano Egon Goransson, Hantverkaregaten 158 Bg 1v.S-21155 Malace, Sweden.
Esperanto Societo „Bude Borjan“ Amruševa 5, 41000 Zagreb, Croatia bezonas adresojn por
internaciaj kontaktoj esperantaj.
S-ano Hongi Liao, Apt.B1k 14, 2809 H Eunos Crescent, SOP 1440 Singapore.
S-anino Linda de Martino, Via S.Martino P.Dei Oielogi N.93, I-82016 Montersarchio (BN) Italy.
17 jj.
S-ano Gaetano Perone, Via Bacile n.7, I-82013 Eonea (BN) Italy, 19 j.
S-anino Lidia Neri Lami, Via Gramaci 92, I-57100, Livorro Italy.
Filatelista asocio VD Ph.Getreidemarkt 1, A-1060 Wien, Aŭstrio, peras filatelistajn interŝanĝojn por
siaj gemembroj.

xmxmxmxmxmxmx
xmxmxmxmxmx
xmxmxmxmx
xmxmxmx
xmxmx
xmx
x

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště, CS